**Protokolo de la 53a senatkunsido** (la 47a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de la XII, la 55a post la fakta eklaboro) okazinta en Komárno dum SUS 27. Kunsidtempoj:
Sabate, 2004-08-28, 10: 15–11:00
Ĵaŭdo, 2004-09-02, 20:00–21:00
Sabato, 2004-09-04, 13:00–13:40

*1. Formalaĵoj.*

Ĉeestas senatanoj Fössmeier, Frank kaj Quednau, krome OProf. Eva Poláková kaj OProf. Helmut Angstl kiel vicsenatanoj. La Senato estas kvoruma kaj decidas la tagordon evidentiĝantan el tiu ĉi protokolo. La protokolon skribu sekretario Fössmeier.

Ek de la dua kunsido vicsenatano OProf. Pennacchietti transprenas la voĉon de Angstl.

*2. Raporto pri la preparoj de SUS 27 kaj la inaŭguro de LEUKAIS*

La senato unuanime decidas, ke la salonoj en la nova akademidomaro en Komárno, strato Župná/Megye 1, estu inaŭguritaj je jenaj nomoj:

| | |
|---|---|
| Sekcio 1: | Hermann Schmidt |
| Sekcio 2: | Jan Amos Komenský |
| Sekcio 3: | Ευκλειδης (Eŭklido) – M. Fréchet – G. Peano |
| Sekcio 4: | René Descartes |
| Sekcio 5: | Galileo Galilei |
| Sekcio 6: | Αριστοτελης (Aristotelo) – Gandhi |
| Arta Sektoro: | Hermann Hesse |
| Scienc-aplika Sektoro: | J. Watt – E. Wüster – K. Zuse |
| LEUKAIS, fak. 2: | Ivo Lapenna |
| LEUKAIS, fak. 3: | Лейзер Заменгофъ (Lejzer/Lazaro Zamenhof) |

Egale uzeblas formoj latin-literigitaj aŭ esperantigitaj laŭ PIV.

*3. Ekzamenofico*

Dum SUS 27 la ekzamenofico havu jenajn nekonstantajn membrojn (parenteze la konstantaj membroj):

| Direktoro: (OProf. Quednau); Vicdirektoro: (OProf. Poláková) | | |
|---|---|---|
| Sekcio 1: | OProf. Frank | (OProf. Fössmeier) |
| Sekcio 2: | PDoc. Barandovská-Frank | (OProf. Korĵenevskaja) |
| Sekcio 3: | (estas nek kandidatoj nek docentoj) | (OProf. Minnaja) |
| Sekcio 4: | ADoc. Macko | (OProf. Angstl) |
| Sekcio 5: | EProf. Lewanderska-Quednau | (OProf. Maitzen) |
| Sekcio 6: | EProf. Leonov | (OProf. Lobin) |

*4. Procesoj*

a) Eksa Senata Sekretario: La postulitaj dokumentoj ankoraŭ ne estis transdonitaj al la ekzamen-ofico; ankaŭ la presilo apartenanta al AIS ne estis transdonita. Prezidanto Frank do komisios notarion Rost ekigi proceson kontraŭ la eksa senata sekretario Joanna Lewoc. Reprezentanto flanke de AIS estos OProf. Lobin.

b) ASci Piotrowski: Kiel decidite dum la antaŭa senatkunsido, prezidanto Frank komisios notarion Rost ekprocesi. AIS-on reprezentos la trezoristo, OProf. Wickström.

*5. Proponoj al la Ĝenerala Asembleo*

a) Ĉar la komisionoj pri regular-aktualigo, starigitaj dum SUS 26, montriĝis tro grandaj por efika diskuto, la ĜA starigu malpli grandajn, al kiuj apartenu la sekvaj AIS-anoj kaj ĉiu, kiu dum la ĜA anoncas sian intereson:

Ekzamenregularo, instruadregularo: Quednau, Poláková, Fössmeier, Frank, Lobin.

Honorregularo: Frank, Fössmeier, Maitzen.

Kotizregularo: Wickström, Lobin, Poláková.

Alvokoregularo, kunsidregularo: Fössmeier, Quednau.

Nova regularo pri akademia strukturo: Frank.

La unue nomitaj estu la prezidantoj de la komisionoj. La ŝanĝoj de la instruregularo klarigu, ke la studaddaŭro en alineo 3.4 estas normalaj studad-daŭroj, kiuj ne nepre preskribas la pason de difinita tempo.

b) SUS 28 okazu en la semajno de la 21a ĝis la 28a de aŭgusto 2005, laŭ invito de EProf. Leonov en Karlovo (BG); se tio montriĝos neebla, ĝi okazu samperiode en Komárno (SK).

c) La ĜA aprobu la rezolucion favoran al la internacia lingvo Esperanto, faritan de la konferenco de la kulturministroj el la novaj EU-landoj en aprilo/majo en Lublin (PL).

*6. AIS-libro*

Ĉar la kompleta AIS-libro kun la necesaj tradukoj ne estas preta, provizore aperu nova ISD-libro, kiun publikigu, kiel ofertite, Universitato Justo aŭ Moskva Ŝtata Industria Universitato (MGIU).

*7. TTT-ejo de AIS*

Ek de 2005 AIS havu privatan TTT-ejon, por kiu estu enbuĝetigitaj jare 200 eŭroj.

*8. Alvokoj*

La senato unuanime alvokas ADoc. Konnerth kiel EProf. respondecan pri la fakultat-departemento en Sibiu-Hermannstadt, en kiu AIS enkorpiĝas.

*9. Acta Sanmarinensia*

La senato proponas al la scienc-ofico, ke ankoraŭ en 2004 aperu nova volumo de Acta Sanmarinensia, kiun eldonu LEUKAIS:

Komárno, 2004-09-04
H. Frank, prezidanto
R. Fössmeier, protokolofico